Kontakto: hokkaido_esp_ligo@yahoo.co.jp (JOKOJAMA)

# Klarigo de ainalingvaj literoj en la flugfolio pri “AinuTimes (ainutaimuzu)”

**Ainalingvo per malgrandaj “katakana" - japanaj literoj kaj novaj ainaj malgrandaj literoj**

La malgrandaj katakana “ㇻ” kaj “ㇼ” en “アカㇻ /a=kar$^a$/, エアㇻキンネ /ear$^a$kinne/, ヌカㇻ /nukar$^a$/, kaj ウエピㇼカレ /uepir$^i$kare/“ en la flugfolio estas la silabfina konsonanto (≈ [ɾ] laŭ IPA), kaj sonas kiel malforta ラ aŭ リ influite de la antaŭa vokalo.

En la internacia normo pri karaktera(≈litera) kodoprezento “Unikodo” ekzistas malgrandaj “katakana” nur uzata en la aina lingvo, ne uzata en la japana.

ㇰ /-k/, ㇱ /-s/ , ッ /-t/

ㇵ /-(a)h/, ㇶ /-(i)h/, ㇷ /-(u)h/, ㇸ /-(e)h/, ㇹ /-(o)h/

ㇷ゚ /-p/, ㇺ /-m/

ㇻ /-(a)r$^a$/, ㇼ /-(i)r$^i$/, ㇽ /-(u)r$^u$/, ㇾ /-(e)r$^e$/, ㇿ /-(o)r$^o$/

Tiuj malgrandaj “katakana” estas ankaŭ la silabfinaj konsonantoj. Tiuj ne ekzistas en la japna fonemo.

Plie vi povas aĉeti ankaŭ la e-librojn “Kindle” de “AinuTimes” serĉante ilin per la japana ŝlosilvorto “アイヌタイムズ” sur “https://www.amazon.co.jp”.

---

La jena “La etno aino” estas cititaj el la sekvaj TTT-ejoj. (La ejoj de la gubernio Hokkajdo)

http://www.pref.hokkaido.lg.jp/ss/tsk/hokkaido_akarenga_kr.htm

http://www.pref.hokkaido.lg.jp/ss/tsk/grp/02/Koreaakarenga7.pdf

## La etno aino

Aino estas unu el etnoj vivantaj en Japanio. Ĝi estas naci-minoritato loĝinta en Hokkajdo, la Nordorienta Regiono de Japanio, Saĥalino, Kuriloj de Ruso kaj aliaj. Kiam la japana epoko Meiĵi komenciĝis, la japana registaro ŝanĝis ĝistiaman loknomon “Ezo-ĉi” en nunan nomon “Hokkajdo” kaj komencis kolonian politikon. De tiam la etno Jamato (=japano) komencis amase enmigris kaj ekloĝis en Hokkajdo. Tial aino fariĝis naci-minoritato. Foje oni ankaŭ uzas la vorton "indiĝena popolo" por la etno aino en la senco, ke la etno vivis tie antaŭ la alveno de japanoj. Oni konkludas de la statistika enketo, ke nuna aina loĝantaro nombras 23,000 personojn. Sed oni konjektas, ke la aktuala loĝantaro atingas de kelkoble ĝis kelkdekoble pli granda ol tiu cifero. Kaj oni konjektas, ke ili loĝas ne nur en Hokkajdo, sed ankaŭ en diversaj lokoj de Japanio, t.e. Honŝuo, Ŝikokuo, Kjuŝuo kaj aliaj.

La aina lingvo estas propra lingvo al aino. Ĝi havas la vortordon similan kiel la japana lingvo, sed kelkajn malsamecojn ol la japana lingvo. El malsamecoj kompare al la japana lingvo la plej granda trajto estas, ke la aina lingvo havas regulon aldoni personan vorteton pri "mi" aŭ "vi" aŭ aliaj al verbo kaj substantivo. Ekde la epoko Meiĵi oni malpermesis uzi la ainan lingvon en edukado kaj devigis ainojn uzi la japanan lingvon. Nun krom la tradiciaj ritoj kaj festivaloj oni preskaŭ ne uzas la ainan lingvon en ĉiutaga vivo. Tamen aino penadas senĉese por gardi kaj tradicii la ainan lingvon, ekz-e malfermi la ainalingvan klason. Pli ol 80% de la loknomoj en Hokkajdo devenas de la aina lingvo. Tio donas taŭgan materialon, por ke oni komprenu la penson kaj vivon de malnovaj ainoj. Kaj la ainalingvaj loknomoj estis elektita je la Hokkajda heredaĵo en 2001 por “ la heredaĵo transdoninda al la sekva generacio".